

# Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaŭdon la 11-an de februaro 2016 per Skype.

(Protokolo aprobita la 10-an de marto 2016)

## Partoprenis:

Anne Karin Bondhus en Bryne  
Jardar Eggesbø Abrahamsen en Trondheim  
Ulf Lunde en Os ekde punkto 7.  
Mario Machlik en Tromsø  
Amelie Matt en Tromsø  
Herman Raness en Trondheim

## 0. Tagordo

Aprobita.

## 1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 14-an de januaro

Aprobita kun eta ŝanĝo.

## 2. Ekonomio

La kasisto raportis pri la ekonomio: Skagen Vekst kr 44 503,- Skagen Høyrente kr 127 934,-.  
Kvankam Skagen Vekst daŭre malkreskas pro la malfacila ekonomia situacio, ni decidis ne tuŝi ĝin, kaj atendi la pliboniĝon de la cirkonstancoj.

## 3. Esperantonia, grundakvo en la kelo

La estraro de la domo estas informita pri la afero kaj oni klopodas trovi solvon pri ĝi kaj havigi kompenson de la asekura kompanio. Dume pumpilo zorgas pri seka kelo, aĉetita kaj funkciigata de la oficejo.

## 4. Respondilo al UEA

Mario sendos la novajn informojn por la jarlibro de UEA. Ni ankoraŭ ne havas la precizan membronombron de 2015, do ni sendos tiun de 2014.

## 5. Membroregistro

Ne estas sekure havi nian membroregistron nur en unu sola loko. Ni celas uzi novan, senpagan programon por tiu tasko, *Open Office*. Ĝi devus esti same taŭga kiel *Access*, kiun ni uzas nun, kaj pli facile instaligebla ĉe pliaj personoj. Anne Karin esploras, kiel ni povus plej facile transigi tien nian registron.

## 6. Apogpeto de la Esperanto-Gastigejo en Lesjølors

Ni bezonas pli da informoj pri la projekto kaj ni devus havi garantion pri ĝia sukceso. La estraro scivolas, kial oni ne prenas prunton de banko, kiam temas pri relative granda sumo kaj la interezo estas rekorde malalta.

## 7. Oferto de NTNU grafisk senter por presi la membrogazeton

La estraro estas pozitiva provi tiun ĉi novan presejon, kies oferto estas malpli multekosta ol la nuna. Ni vidos, ĉu la kvalito fariĝos same bona kaj ĉu ni estos kontentaj pri la liverado. Ni informiĝos, ĉu oni bezonas de ni dokumenton por ricevi *Momsfritak* (sendevigon de varimposto).

## 8. Dokumentoj, konservitaj ĝis nun ĉe Thomas Knudsen

La banko, kie Thomas Knudsen konservis niajn gravajn dokumentojn, ne plu ofertas tian servon. Ni pensas, ke dume tiuj dokumentoj estu en Esperantonia kaj poste ni provos trovi pli sekuran lokon por ili. Eble tiun taskon povus transpreni la kasista firmao, kiun la domposedantaro uzas, aŭ ni povus instali sekuran ŝranketon en la oficejo por gravaj dokumentoj.

## 9. Eventualajoj

Nenio.

La interkonsiliĝo daŭris 19:30 - 20:40

La venonta interkonsiliĝo okazos la 10-an de marto 2016.

Raportis Mario Machlik